n-ro 47

januaro 1995

ISSN 0941-9306

# La Merkato

Profesoro Reinhard SELTEN, germana ekonomikisto kaj esperantisto, antaŭ nelonge ricevis nobel-premion. F.J. Braun, prezidanto de IKEF, gratulis lin en la nomo de IKEF.

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

Enhavo

Novjara mesaĝo de la prezidanto . . . . . . . . . . . . . . 3
D-ro Polerani iĝas komitatano A de UEA . . . . . . . . . 4
IKEF havas grandan signifon . . . . . . . . . . . . . . . 5
Raportoj pri IKEF-kunvenoj . . . . . . . . . . . . . . . 6
Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj . . . . . . . . . . . . . 8
Strategio: Ni praktike uzu Esperanton ! . . . . . . . . . 9
Japanio: nova kontonumero de la peranto . . . . . . . . . 10
Niĝerio: atentu ! . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 10
Anoncitaj aranĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 11
Provinca komerco en Koreo . . . . . . . . . . . . . . . . 12
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . . 14
Novaj aliĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 16
Eŭropa Unio: novaj trejnadaj programoj . . . . . . . . . 16

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

La Merkato (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Identecŝildaro estas jara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo: ĉe s-ro Frans Josef Braun,
Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado: ĉe s-ro Roland Rotsaert,
Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32.(0)50.330004.

<u>Atentu !</u> Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur <u>send</u>adreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))Q

La jara membreca kotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj.
Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

Kontoj: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per eŭroĉeko (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT.

Perantoj:

Cinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao,
CN-710054 Xi'an

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, F-55000 Longeville en Barrois
(CCP 1275-89 L Nancy)

Germanio: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl
(Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István GETHER, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Marco PICASSO, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi,
Higasi Koigakubo 3-18-12 (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 1400 enoj)

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Pollando: S-ro Maciej PIEGAT, ul. Dantego 1-B/48, PL-01-914 Warszawa

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Novjara mesaĝo de la prezidanto

Estimataj gekolegoj,

La nova jaro 1995 estas grava por ni; ni festas la dekan fondo-datrevenon de IKEF.  Dum la Universala Kongreso en Augsburg okazis je la 6a de aŭgusto 1985 la fondkunveno kaj la aprobo de la statuto.  Tiu lasta ankoraŭ hodiaŭ senŝanĝe validas.  La preparaj laboroj por tio estis faritaj jam ekde 1984 de nia kunfonda membro kaj posta Ĝenerala Sekretario, s-ro Lawrence Mee, kaj mi.  La unua "Laŭokaza Novaĵletero" (antaŭanto de "La Merkato") verkita de s-ro Mee datas 6a de julio 1984.

Kio okazis en tiuj dek jaroj ekde tiam ?  IKEF baldaŭ fariĝis "Kunlaboranta faka asocio kun UEA".  Ĝia membronombro konstante kreskis de 32 en la fondjaro ĝis 115 fine de 1994.  Pri la ĉefaj agadoj la estraro raportis ĉiujare detale en sia jara raporto en "La Merkato".  La financa situacio estas sana, mi permesas aldoni "kiel decas por ekonomia/komerca asocio", kaj ne mirige ĉe diligenta Financa Konsilanto kaj membrar-administranto, kia estas s-ro Roland Rotsaert.

Dum la pasinta jaro ni atingis plian gravan sukceson.  IKEF estis akceptita de UEA kiel "aliĝinta faka asocio al UEA".  Ni i.a. rajtas per tio delegi propran anon en la Komitaton, la superan organon de UEA.  Nia membro de la unuaj tagoj, d-ro Gianfranco Polerani el Milano estonte reprezentos nin en la UEA-Komitato.  Menciindaj estas la laŭdaj vortoj de s-ro Osmo Buller, direktoro de la Centra oficejo de UEA, pri IKEF kiel "unu el la plej aktivaj kaj modelaj fakaj asocioj".

Kompreneble tia laŭdo devontigas nin, ke ni daŭrigu nian ŝajne sukcesan agadon.  Ankaŭ la dekjariĝo de IKEF postulas apartan aktivecon en la "jubilea jaro" 1995.  Konsidere al tiu jubilea jaro, la estraro prezentis en "La Merkato" n-ro 45 sur paĝoj 4-7 la "agadprogramon '94/95".  Temas pri listo de rekomendinde taŭgaj agadoj por nia ĝenerala celo "akceptigi kaj enkonduki la internacian lingvon Esperanto en komerco kaj ekonomi(k)o".

Ĉiu membro faru ion el la agadprogramo '94/95, kio estas por li/ŝi plej facile realigebla aŭ kio rilatas al lia/ŝia profesio, ĉiutaga laboro aŭ hobio, aŭ kio simple plaĉas al

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

li/ŝi kiel defia tasko. Ni hodiaŭ kiel aldonaĵon ankoraŭfoje kunsendas la agadprogramon '94/95 al vi.

Plie mi elkore invitas vin al nia ĝenerala Kunveno, kiun ni okazigos dum la ĉi-jara UK en Tampereo, Finnlando. Kompreneble ni klopodos digne festi nian jubileon.

En tiu senco mi deziras al vi bonan novan jaron 1995, sanon, feliĉon kaj prosperon, kaj ne lastrange plezuron kaj sukceson en via agado por la celoj de IKEF.

Samideane via

Franz Josef Braun

<u>D-ro Polerani (IKEF 12) iĝas komitatano A</u>

Aliloke en ĉi tiu revuo vi povas legi ke IKEF iĝis aliĝinta faka asocio de UEA. Pro tio IKEF rajtas delegi komitatanon.

La estraro nomis d-ron Polerani kiel komitatanon A en la Komitato de UEA por la periodo 1995-1998.

Citaĵo el letero de Osmo Buller, direktoro de la centra oficejo de UEA al d-ro Polerani:

Mi bonvenigas vin kiel membron de la Komitato, nia supera organo. Mi estas certa, ke vi povos kontribui al ĝia laboro per viaj ideoj kaj aktiveco kaj ke pere de vi la Komitato profitos ankaŭ de impulsoj, kiuj venos de IKEF. Kiel mi pli frue skribis al IKEF, temas pri unu el la plej aktivaj kaj modelaj fakaj asocioj, kaj ĝia akcepto kiel aliĝinta faka asocio estis pli ol bone motivita.

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

IKEF havas grandan signifon

En 1995 estos la 10jara datreveno de IKEF. Nun ni vidas fakton, ke la membroj de IKEF jam troviĝas tra la mondo. Ja, nia afero progresas pli rapide ol noblaj aŭtoritatuloj iam aŭguris. Tio estas interesa fenomeno, kiam multaj Esperanto-organizoj perdis multe da membroj, eĉ malaperis senbrue. Kial okazas la fenomeno ?

Kompare mi estas juna esperantisto, sed tutenergie okupas nian movadon jam 15 jarojn. Post mia praktiko mi konas la veron, ke nuntempe ni ne eblas sukcesi per la nombro kaj kvanto. Sen tio la turisma afero kaj kultura aranĝo de Esperanto estas malpotencaj kiel ni vidas la fakton, kion ĉiam neglektas la ekstera socio. Sed ni povas per la utiligo kaj kvalito atentigi la socion. Jen la plej bona modelo estas IKEF, ĉar la praktikanto de la komerco ne postulas nombron aŭ kvanton, sed la bonan kvaliton. Se unu sukcesis en la komerco pere de Esperanto, kelkaj konas la utiligon; se iuj sukcesis, multaj kredas ĝian valoron. Kiam ni posedas la kvaliton, ni povas pli facile havi la nombron kaj kvanton. Tio esprimas ke la praktiko de IKEF kaj aliaj fakgrupoj havas grandan signifon por nia Esperanto-movado, eĉ pli ol amatoraj Esperanto-kluboj. Ni esperas ke la praktikantoj de Esperanto en la komerco kaj aliaj fakaj kampoj laboru fiere kaj pacience, ĉar nia praktiko influas sorton de nia movado.

Bedaŭrinde en nia Esperantujo multaj aŭtoritatuloj ankoraŭ ne senpartie taksas la praktikadon de Esperanto en la komerco. Fakte la komerco kiel nia lingvo Esperanto estas demokratia afero kompare kun multaj en la mondo. Ni devas ŝanĝi la partian pensmanieron, kaj pli okupi la praktikon ol iliaj, ĉar la aliaj sen la praktiko estas ridindaj aferoj sur papero. Pro tio je unu flanko ni devas konfesi ke IKEF ankaŭ havas grandan signifon por nia aktuala movado. Sed mi devas mencii ke, kvankam IKEF donas al nia movado pozitivan influon, tamen ĝi ankaŭ kiel aliaj en Esperantujo heredis malbonan tradicion, ke oni tro multe hobias akademian stilon. Tio kaŭzas perdadon de la membroj. Ni povas difini la adademian stilon malmoda al nia movado. Nun ni ne tre bezonas la simpozion, sed la festivalon kaj foiron.

WANG Tianyi

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Raportoj pri IKEF-kunvenoj en Shenzhen kaj Seulo

Kunveno en Shenzhen (ĉe Hongkongo), 21-22 aŭgusto 1994

La kunveno estis preparita de IKEF-membroj Du Shou-he (80) kaj Lee (11). Estis 16 gealiĝintoj el Ĉinio kaj 9 el ekster Ĉinio. Je jaŭdo (21a) estis matene solena inaŭguro kaj prelego, posttagmeze vizito al lampara fabriko kaj vespere amuza vespero. Je vendredo (22a) okazis dumtage vizito al solar- (sun-) elektrika energia fabriko kaj vespere bankedo.

Ĉar s-ro Braun, pro sana problemo, ne povis ĉeesti, s-ro T.S. Lee anstataŭis lin por prezidi la kunvenojn. S-ro Du Shou-he en la nomo de Shenzhen-Esperanto-Asocio antaŭgratulis la sukceson de la IKEF-kunveno.

S-ino Flory Witdoeckt prelegis pri praktika uzado de Esperanto en komercaj aferoj kaj prezentis ankaŭ vidbendon de belga kompanio kun klarigoj en Esperanto. Ŝi sukcesis peri kontakton de belga kun ĉina fabriko por diskuti pri la establigo de komunriska fabriko en Ĉinio, kaj atingis la interkonsenton de ambaŭ partioj. Tiu perado okazis en Esperanto. La sukcesa ekzemplo de s-ino Witdoeckt pri la uzado de Esperanto en komerca afero tre instigis la kunvenantojn.

Krom la aliĝintoj, pli ol 10 aliaj gejunulaj esperantistoj el Shenzhen partoprenis la amuzan vesperon. Multaj partoprenantoj estis komercistoj kaj eĉ dum la amuza vespero ili kaptis la okazon por paroli pri komercaj aferoj.

Ĉina peranto (Wang Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 Hao, CN-710054 Xi'an) planas venontan kunvenon en Xi'an (centre de Ĉinio, ĉefurbo de la antikva Ĉinio kaj startloko de la Silka Vojo) je 1-5 decembro 1995. Ideoj kaj ofertoj jam nun estas bonvenaj.

(laŭ raportoj de Wang Tianyi kaj T.S. Lee)

Informa kunveno okaze de la 79a UK (jaŭdo 28 julio 1994)

Estis entute 25 ĉeestantoj. IKEF-prezidanto Braun ne povis ĉeesti; IKEF-estrarano Yamasaki pro alia urĝa afero nur alvenis je la fino de la kunveno. Pro tio IKEF-membro T.S. Lee prezidis la informan kunvenon.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S-ro Lee en la nomo de s-ro Braun kaj de la IKEF-estraranoj salutis la kunvenantojn. Li voĉlegis informon pri IKEF, preparitan de s-ro Braun kaj samtempe prezentis ankaŭ la tralumajn foliojn pri IKEF.

Multaj kunvenantoj interesiĝis pri la agadoj de IKEF. Ilia ĝenerala opinio estis, ke IKEF faru pli da reklamo pri siaj agadoj, por ke IKEF estu pli konata en Esperantujo.

Dum la kunveno ne jam estis decido pri la aliĝo de IKEF al UEA. La 29an de julio la Komitato de UEA voĉdonis ke IKEF estas akceptata kiel <u>aliĝinta faka asocio de UEA</u> (36 por, 0 kontraŭ, 2 sindetenoj).

T.S. LEE

<u>Raporto pri komerca agado en 4a IAKSTE (Internacia Akademia Konferenco de Scienco kaj Tekniko en Esperanto)</u>

Antaŭ la konferenco, 13 altaj lernejoj de Beijing donis al la konferenco pli ol 2000 publikigotajn temojn de novaj kaj altaj teknikoj, por transdoni ilin al bezonantoj. En la kunveno reprezentantoj de 11 altaj lernejoj kaj ŝtata Scienca Komisiono konigis pli ol 250 cedeblajn novajn teknikajn programojn. Pli ol 30 reprezentantoj el diversaj lokoj de la tuta lando ĉeestis. Liverantoj kaj bezonantoj faris seriozan intertraktadon kaj atingis ne mulmultajn protokolojn.

S-ino Flory WITDOECKT, el belga ekonomia kaj komerca rondo, konigis akvopurigan instalaĵon kaj trovis bonvenon de ĉeestantoj. Scienc-teknikaj esploraj institucioj kaj komercaj kompanioj de Pekino, Tiantaj de Zhejiang, Changsha de Hunan, Fushun de Liaoning, Lingyi kaj Tan Chen de Shandong, Tianshui de Gansu kaj Chifeng de Interna Mongolio ekspoziciis siajn novajn produktojn, lernis spertojn, akiris multajn informojn kaj faris intertraktadon kun aĉetontoj.

E-Asocio de la gubernio Tangcheng (adreso: p.a. Ekstera Ekonomia kaj Komerca Komisiono, Gubernio Tancheng, CN-276100), kun plenforta subteno de Limigita Kompanio Huagang, Sanigila Kompanio Shenli kaj aliaj, sendis du reprezentantojn. Ili aktive propagandis investan medion de la gubernio, precipe la riĉan fonton de ginko kaj aliajn avantaĝojn. Ili ekspoziciis specimenojn kaj disdonis

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

informilojn de la jam nomitaj kompanioj kaj de Biera Limigita Kompanio Xiangling. Surbaze de la ricevitaj reagoj kaj informoj okazos pluaj kontaktoj kaj konsultadoj.

Raportita de STEA ĉe ĈAS

Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj

Ĉi tiu revuo, redaktata de Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio en Ĉina Akademio de Sciencoj, aperas en lingvoj ĉina kaj esperanta. En 1993 kaj 1994 ĝi ricevis premion de FAME- kaj Grabowski-fondaĵoj.

Estas kelkdekaj rubrikoj: scienc-teknika forumo, antaŭvidu estontecon, politiko de scienca evoluo, scienco-ekonomio-socio, IAKSTE-disertaĵoj, novaj produktoj kaj teknikoj, komerca kunlaboro, kuracado kaj sanprotektado, ktp.

Abonkotizo: 12 USD jare, pagotaj al UEA-konto "tekn-m", aŭ pere de UEA-libroservo aŭ vialanda peranto.

Shen Chengru

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Strategio:  Ni praktike uzu Esperanton !

La sekvantaj rimarkoj estas vidpunkto de pola "provinca aganto", kaj reago al artikolo en la revuo Esperanto (11/93): "La esperiga kolapso".

En la lastaj jaroj volontuloj - bazo de E-aktivado - preskaŭ malaperis; homoj simple ĉesas interesiĝi pri internacia lingvo.  Ofta kaŭzo de malmotiviĝo estas elreviĝo:  "dum tiom da jaroj mi agadis, kaj mi ne vidas progreson kaj rezultojn".

De tempo al tempo troviĝas idealisto, kiu en si mem trovas fortan filozofian motivigon; tia idealisto estas plej imuna kontraŭ elreviga viruso, ĉar li scias ke grandaj transformiĝoj ĉivilizaciaj postulas epokojn.

Sed idealistoj estas malmultaj kaj ne vivtenos la tutan E-movadon.  Do gravas ke Esperanto estu alloga kaj interesa okupiĝo, t.e. ke ĝi estu praktike utila, kiel ĉiutage bezonata varo.  Kiel Esperanto povas esti utila ?

*     Kiam ĝi helpos trovi laboron ĉu enlande, ĉu eksterlande (ekz. portempan laboron ĉe rikoltado de fruktoj ktp.). Feliĉe jam ekzistas revuoj, kiu publikigas tiajn anoncojn, sed estus bone, se troviĝus pli multaj homoj kiuj povus dungi esperantistojn.

*     Kiam ĝi permesos iamaniere gajni monon, ekzemple pere de komercado.  Tiu branĉo disvolviĝas kaj ni helpu ĉiumaniere al homoj kiuj pere de Esperanto deziras komercadi, fondi firmon aŭ informan oficejon, ktp.

*     Kiam ĝi permesos al homo solvi propran dolorigan problemon: problemon de soleco.  Servoj povas esti diversaj: de klubaj kunvenoj, tra korespondado kun leteramikoj, ĝis geedziĝo.

*     Kiam ĝi helpos al homo satigi iun artan, intelektan aŭ profesian bezonon.  Por tio jam servas E-gazetoj, la delegita reto de UEA kaj diversaj fakaj asocioj, sed, pro altaj kotizoj, ne ĉiuj havas aliron al ili.

Jan Ksiazek (Esperanto-svat-servo), ul. Paderewskiego 6, bl 48, m 2, PL-97300 PIOTRKOW TRYBUNALSKI.

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

Japanio: nova kontonumero de nia peranto !

La japanaj poŝtoj ŝanĝis la numeran sistemon de siaj ĝirkontoj. La kontonumero de s-ro Yamasaki nun estas
00160-3-253232.

Niĝerio: atentu !

Jam dum jaroj okazis al kompanioj, kaj nun okazas al privatuloj: niĝerianoj skribas leterojn en kiuj ili faras tre allogan proponon por facilege riĉiĝi sen ia ajn laboro ! Temas pri trompaĵo kaj oni neniam respondu tiajn leterojn. Laŭ sperto de IKEF-ano Kees Ruig ankaŭ niĝeriaj esperantistoj iel kunlaboras al tio.

(laŭ Eventoj, 1/dec. 94)

Internaciaj radio-elsendoj per satelito: Ebleco por kapti reklamojn ?

Iom post iom por la tutmondaj radio-elsendoj estas uzantaj ne nur la mallongajn ondojn, sed ankaŭ satelitojn, kiu donas kvazaŭ perfektan sonan kvaliton. En Esperantujo tiun paŝon jam faris Radio Zagreb, Radio Vatikana kaj Pola Radio.

Por kapti tiujn elsendojn necesas specialaj parabola anteno kaj ricevilo. Ties prezoj konstante falas, sed ĉe eblaj aŭskultantoj simple mankas la informoj pri la aparataro. Eble la E-gazetaro povas ĉe la koncernataj produktantoj sukcese varbi reklamojn ? Esperantistoj ja estas ideala publiko por ili !

(laŭ sugesto de A. Pettyn en revuo de Pola Radio)

Anoncitaj aranĝoj

Ĉehio

La simpozio "Entreprenado pere de Esperanto", planita por aŭtuno 1994, ne okazis pro malmultaj anoncintoj. Ĝi okazos en printempo de 1995: 10-14 majo. Ĉar evidentiĝis ke la aliĝa kotizo por iuj kategorioj estis tro alta, oni antaŭvidas pli modestajn eblecojn.

Petu detalajn informojn de d-ro Petro CHRDLE, Kava-Pech, Anglická 878, CZ-25229 DOBŘICHOVICE (Praha), telefono kaj fakso +42-2-9912126.

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Francio

En marto 1995 la komerca ĉambro de Avignon okazigos kunvenon kun la temo "Esperanto kaj komerco en la mondo". Etikedoj, informiloj, dokumentado... en Esperanto estas bonvena ĉe s-ino Claudine RACLE-DYEL, 24 rue Lanterne, F-84000 AVIGNON (tel. 90.27.01.16) (IKEF 49).

Svislando

Bielo, 21 aprilo - 2 majo 1995: MOLGA-kongreso de gente duonigitaj urboj. (MOLGA = Mond-organizo de unuiĝintaj nacioj por la unueco de la lingvo, gramatiko kaj alfabetoj). Informoj: Esperanto-Forumo, "Parzifal", Pf. 3163, CH-2502 BIELO 3.

Ekonomia historio de Eŭskio

En la revuo Eŭska Kverko dum 1994 aperadas serio de artikoloj kiu priskribas la evoluon de la jura kaj ekonomia situacio en Eŭskio de la mezepoko ĝis nun. Informoj pri la revuo: Grupo Esperantista, Barrenkale Barrena 7-1, E-48005 BILBO, Hispanio. Abono kostas 1000 pesetojn aŭ 15 nederlandajn guldenojn (UEA-konto: kver-j).

Provinca komerco en Koreo

(el Leteroj el Suda Koreo, Anatolij Kim, en revuo Druĵba Narodov, el rusa esperantigis I. Sitnikov)

En antikva tempo rusoj nomis komercistojn per vorto kun ĉefa senco - gasto, vizitanto. En Koreo male - per gasto aŭ vizitanto oni nomas aĉetanton.

Rusaj komercistoj por sia komerco vojaĝis en malproksimajn landojn, kaj sia vivo havis multe da necertecoj kaj danĝerecoj. Sur vojoj atakis ilin malbonaj rabistoj. Kial tial rusa komercisto kutime estis ankaŭ scipova batalanto, kapabla rebati raban atakon kun glavo en la mano.

Rusio estis grandega lando, vojaĝoj estis longaj, kaj komercisto por lokaj loĝantoj estas ĉiam bonvena riĉa gasto.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

Sed en Koreo, kie per gastoj oni nomas aĉetantojn, komercisto trankvilege sidas sur sia loko kaj atendas klienton. Korea komercisto similas ne ĉasiston, kiu vagas tra la arbaro kun fusilo en la mano, sed fiŝiston, kiu atendas, kiam fiŝo tuŝos la hokon.

En koreaj provincaj urbetoj kaj rezidejoj estas multe da malgrandaj butikoj kaj vendejoj. Iufoje vi eniras en tian butiketon, sed tie ŝajne neniu estas. Sed la mastro nepre aperos el ia flanka pasejo aŭ el post la malgranda pordeto, kiun vi ne ekvidis. La mastro povas esti viro aŭ virino, junulo aŭ maljunulo kaj iufoje eĉ lernaĝa infano. Kun ĉiama demanda mieno la "fiŝisto" gardas klienton: kion tuŝos la fiŝo ?

En bazaro neniu laŭdas sian varon, kiel oni faras en la tuta resta mondo. La varo estas elmetita por pririgardo kaj certe restas silenta. En vastaj provincaj bazaroj kaj en labirintoj de vendotabloj, superŝutintaj per amasoj da varoj, estas preskaŭ muzea silento. Neniu anoncas per laŭtega voĉo, ke li havas plej bonajn en la mondo kokinojn aŭ manĝeblajn flamruĝajn ranojn.

Ofte, enirinte en vendejeton, vi povos vidi komerciston, kuŝantan sur la altaĵo kaj dolĉe dormantan sub la litkovrilo. Foje en Pjengtjek, enirinte en viandan butiketon, por aĉeti bonegan freŝan bovaĵon, mi ne trovis en mi kuraĝon veki profunde dormantan viandistinon.

Certe, vi ne vidos tiajn scenojn en modernaj seulaj ĉiuvendejoj kaj superbazaroj. Tie ĉio bolegas, kaj nuntempa agreseco de komerco neniom diferenciĝas de tio, kion oni povas vidi en la mondo de vendaĉo-aĉetaĉo ie en Eŭropo aŭ Ameriko.

Sed per io mi kore ŝatas la senzorgecon, pacan kontempladecon kaj idilion de provinca komerco en Koreo !

Ĉia nacio havas siajn komercistojn, kiuj diferenciĝas nur per iliaj aferaj kutimoj kaj manieroj. Sed ĉiu komercisto estas komercisto. Li ĉiam prosperas en la vivo, ĉu li mem rapidas kiel gasto al aĉetantoj aŭ male, ĉu li sidas sur sia loko kaj atendas aĉetanton kiel sian gaston. Neprosperaj komercistoj ne estas, ĉar se ili ne prosperas, ili finiĝas esti komercistoj.

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

Komerco, profito, mono... En nuntempa mondo, plena per interna streĉo kaj maltrankvilo, nur la masko de komerco elradias absolutan bonstaton kaj certan optimismon. Tia estas la tempo - epoko de maksimuma laŭdado de materialaj bonoj. Religio de riĉo. Filozofio de banka konto.

Ne evitis ĝeneralan faton kaj juna Korea Respubliko. Lokoj de famaj seulaj marĉandujoj similas grandiozajn religian misteradojn, kiuj estis en histerio de homaro. Ĉiutage okazas tie ĉefaj misteradoj de nia tempo: komerco, business, vendaĉo-aĉetaĉo.

Nevole mi rememoras kaj aliajn, pli grandiozajn scenojn de nuntempaj komercaj misteradoj. Mi ekmemoras ĉiovendejajn palacojn de Germanio, grandiozajn vendotablojn de Ameriko, brilantajn kiel perlamoto kvartalojn de riĉaj amerikaj kaj japanoj vendejoj en Honolulu en Havajaj insuloj. Kiaj fieraj kaj majestaj servaduloj de komerco okazas tie ! Veraj ĝiaj idolpastroj, aligitaj al superaj misteroj. Kaj por ili vi - koreano, ruso aŭ iu alia, tute ne estas kara gasto - vi estas nur ordinara religiulo, vizitanta la templon por reverenci al ilia dio.

El paca interŝanĝado komerco transformiĝis hodiaŭ en nevideblan totalan militon, en kiu devas partopreni ĉiuj. Kaj kiu estos venkinto ?

Sed la antikva korea maniero - sidi en butiko kaj atenti gastojn - estas plej normala metodo de komerco.

Kaj imagas mi tieajn provincajn komercistojn, kiel humilajn paŝtistojn sur la paŝtejoj de nuntempa nacia konsumado, kaj iliajn varojn - kiel obeaj ŝafoj.

## Komercaj petoj kaj proponoj

### Albanio

Firmao KARAJANI (IKEF 176), Rr Punetoret e Rilindjes, P.2 A.63, Tirana, fakso +355-42-23972, sin okupas precipe pri aĉeto kaj vendo de koloraj metaloj (teknologiaj restaĵoj aŭ puraj). Ĝi pretas vendi aŭ aĉeti je favoraj prezoj kvanton

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

ĝis kelkaj ŝarĝaŭtoj monate. Krome, ĝi peradas albanojn kaj fremdulojn por trovi en Albanio merkaton, ejojn, grundojn, diversajn informojn.

Ĉinio

S-ro Tu jian-yi, vic-sekretario de Sichuaa provinco E-asocio, pretas helpi en eksportaj, importaj kaj komercaj aferoj. Adreso: P.O.B. 87, CN-610011 CHENGDU, SICHUAN; telefono 0086-28-6749429 (hejme), 6755505 (oficeje).

Pollando

Perado por komerco en medikamentoj kaj medicina ilaro: s-ino Maria SROGOSZ, str. Mieszczańska 3 m 18, PL-93 322 ŁÓDŹ, tel. 042-462709 (IKEF 64).

Ruslando

Lignaĵaj varoj (framoj por fenestroj kaj pordoj, pinia oleo kaj lako); komputado kaj programado (precipe instruaj programoj por fremdaj lingvoj); turismo en sovaĝa naturo; eldonoj; informa banko pri rusaj inventoj kaj teknologio: s-ro Andreo Bochkarev, Oktjabrskaja 61-1, RUS-636842 KOMSOMOLSK Tomskaja obl.

Aĉeto de viando (ĉefe kokida). Vendo de lignaĵo, cemento, glaso, torfo. Investoj en novteknologia (oranĝeria) agrikulturo. Privata firmo disponas pri necesaj devizoj, propraj transportiloj kaj subteno de municipalaj estroj. Anatolo SIDOROV, Str. Dimitrova 24-A-21, RUS-241037 BRJANSK.

Togolando (Okcidenta Afriko)

Afrikaj produktoj, i.a. pentraĵoj, artaĵoj, ĉiuspecaj reptiloj, tradiciaj vestaĵoj; aĉeto de malnovaj aŭtomobiloj por revendo: s-ro Patrice Kossivi ASSIOBO, B.P. 60614, Lomé.

Usono

D-ro Boris Kolker, 1300 Superior Avenue, apt. 2109, Cleveland OH-44114, estas interesata kunlabori kun esperantistoj kiuj okupiĝas pri internacia negocado.

Novaj aliĝoj (post apero de identecŝildaro 1994-1995)

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

195. S-ro Ottmar JAREB, Blücherstr. 42, D-71116 GÄRTRINGEN
196. S-ro Kurt LANGER, Im Fasanenwäldchen 4, D-69126 HEIDELBERG
197. S-ro Igorj SITNIKOV, ul. Internacionalnaja d. 19, kor. 1, kv. 59, RUS-390039 RJAZAN
198. S-ro ONO Takao, Kazigaya-tyo 43-8, Sakae-ku, Yokohama 247, Japanio, tel. 45.894.5339, fakso +81.45.894.9145 Internet JACO04046(a)niftyserve.or.jp
199. S-ro Andres MARTIN GONZALEZ, Apartado 3275, E-29080 MALAGA, Hispanio
200. S-ro Liu Xiaozhe, 32 North Youhao Road, CN-830000 URUMQI, tel. +86-991-4841216-219, fakso 4841546; importo, eksporto, produktado (i.a. teo, ledaĵoj), diversaj servoj (datala anonco aperos en venonta LM).

Internacia Tradukreto pere de Esperanto (ITRE)

Al ĉi tiu numero de La Merkato estas aldonita kvarpaĝa ITRE-diskutilo. Kelkloke erara telefon- kaj faksnumero de ITRE estis anoncita; notu la bonan numeron: (33) 41 78 47 75.

Eŭropa Unio: novaj trejnadaj programoj

La Eŭropa Unio komplete restrukturigas siajn programojn por interŝanĝoj, instruado kaj profesia trejnado. Ili estas regrupigataj sub la nomoj Socrates (antaŭe Erasmus kaj Lingua) kaj Leonardo. De ĝi povos profiti enloĝantoj de la Unio, sed ankaŭ de mez- kaj orienteŭropaj landoj.

Por konigi la programojn EU eldonas belan revuon La Magazine (verŝajne nur en angla kaj franca lingvo, bedaŭrinde mankas utilaj informoj en ĝi). La novaj administraj reguloj ankoraŭ estas ellaborataj; eble iu IKEF-ano por venonta LM sukcesos havigi kompreneblan klarigon. Adresoj: Task Force Human Resources, Education, Training and Youth, rue Belliard 5, B-1040 Bruselo, fakso +32-2-2950138; European Training Foundation, Viale Settimio Severe 65, I-10153 TORINO.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q